

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161

Cena: dobrovolný příspěvek

Povolil OÚ Ml. Boleslav, odb. kultury čj.47/87-403/16

Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze,
č.j.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1998

xmxmxx
Numero 3 Julio 1993 Červenec Číslo 3

xmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxx

Ĉu vi kapablas argumenti por Esperanto? (Daŭrigo)

Ni pritraktu (projednejme) la unuan riproĉon, kiun ni citis en la lasta nia numero: La kontraŭloj de Esperanto asertas (ujiŝtŭji), ke „E-o estas lingvo arterafita“, kiu ne havas ŝancon hejmiĝi inter aliaj landoj (zdomácnĕt), kiuj sentas fortan emon por sia gepatra lingvo. Ilia denaska (od narození) esprimkapablo (vyjadřovací schopnost) de ĉiuj sentoj dŭm kaj sobra pripensado kaj la stato de emocio helpas, ke la homo ne elektas terminojn kaj rapide esprimas neceson. Li parolas tute libere, sen penado de sia memoro pri nekutimaj vortoj, ne bezonas vortaron, ne bezonas gramatikajn sciojn, lacigajn (únavné) regulojn. Tia estas la situacio de uzanto de gepatra lingvo, kiu respondas al denaska uzo. Tamen alilandano devas klopode en memoro serĉi la pravan esprimon. Por scii perfekte lingvon, oni bezonas longajn jarojn kaj multaj modestaj longjaraj esperantistoj ne kuraĝas aserti, ke ili la internacian lingvon scias perfekte. Vi certe konas kelkajn rifuĝantojn, kiuj restis en nia lando. Preskaŭ (téměř) ĝis fino de ilia vivo laŭ akcento kaj nacilingva elekto de esprimoj vi povas ekkoni ilian naciecon, eĉ tiam, se temis pri homoj kun granda eduktiteco kaj lingva talento. Tiaj homoj sentiĝas por ĉiam iom „ekstergrege“ (grego = stádo) kaj nostalgias pri sia iama patrolando. Forigo de tiu sento bazas nur en nia diligenteco. Ni devas multe legi, gajnu sufiĉan maksimuman vortprovzion. Se ni ne havas okazon por paroli esperante, ni uzu IL-on (Internacian lingvon) eĉ dum pensado – irante tra la strato en pensoj, priskribu, kion vi vidas, daŭre pensu en Eo; se mankas terminoj, eltrovu en pli ampleksa vortaro (ekz. Filip, kiu kuŝas en stokoj en nia asocio) ilin kaj pliriĉigu viajn sciojn. Spertaj esp-istoj en via klubo ĉiam kun ĝojo helpas. En via pensado Eo perdo sian „artefaritecon“, vi parolos senpene, senbariere. Legado de beletrio kaj gazetoj aŭ de leteroj de viaj eksterlandaj amikoj alportos por vi la pravan ĝuon. „Por ke estu la lingvo universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia“ skribas Zamenhof mem. S.J.Lec, pola satiristo, skribas: „Kresku en Eo dialektoj, enamiĝintoj (zamilovaní) kveru (vrkat) en ĝi, eble okazos miraklo kaj ĵusnaskito (novorozenec) ekpepos (zapípá) en ĝi. Ne forgesu blasfemojn (nadávky), ili aldonas brilon al la lingvo. Alvenos tempo, kiam Eo forlasos epokon de purismo kaj kiel ĉiuj lingvoj pruntados ĉe aliaj Ĉu tio jam okazis? Des pli bone!“ Pri disvastigo de Eo decidis ne nombro de uzantoj, sed ilia kvalito. Se du esperantistoj renkontiĝos en urba tramo kaj flue interparolos sen balbutoj, emociplene kun rido kaj ŝanĝe kun serioza tono, plej favore pri ĝeneralaj temoj, la ĉeestantaj (přítomní) kunveturantoj ekatendiĝos (zbystří pozornost) kaj divenos, kiun lingvon ili parolos, kelkaj eĉ kuraĝos demandi ilin aŭ siajn kunveturantojn, kaj tiam vi provos ĉeĥlingve klarigi kaj propagandi por Eo. Vi devas esti preparataj pri ilia seniluziga rifuzo kaj proklamo, ke la interparolonto deziros montri sian supraĵan informitecon kaj ĝuste kun enua mieno diros: „oh, tiu artefarita lingvo? Mi pensis, ke ĝi estas jam delonge folasata.“ En tiu momento eltiru vian elokventecon (výmluvnost) kaj helpe de modestaj faktoj, kiujn vi hodiaŭ en nia bultenejo legis, argumentu. Se vi vidos stultulon, ne perdu tempon kaj kun ĝuo daŭrigu vian viglan interparolon kun via kunveturanta esperantisto.

E ĥ o de la legantoj pri „argumentado“: ... Informado kaj argumentado tute ne estas instruata al esperantistoj ... Se vi fine kapablo kompili broŝuron kun ĉiuj ĉefaj faktoj kaj argumentoj kaj ankaŭ kun instrukcioj, kiel utiligi tiujn faktojn kaj argumentojn, tiam vi faros tre gravan kaj meritplenan laboron, kiu levos nian amatoran movadon al pli alta ŝtupo. La neinformitaj neesperantistoj prezentas al ni ne nur riproĉojn, sed ofte simplajn kaj eĉ naivajn demandojn pri Esperanto, ĝia movado, pri la literaturo, utileco kaj uzebleco de la lingvo ktp. Do estas necese bone informi trankvile, kun scio kaj kompreno pri la faktoj, tute nefanatike kaj sen videbla strebo (ŭsilí) tuj esperantigi la demandinton. Homoj ofte miras aŭdinte, ke mi okupiĝas pri Esperanto. Kial vi ne lernas la anglan, germanan aŭ alian lingvon? Do, mi respondas simple per tio, ke Esperanto plaĉas al mi. Ĝi kontentigas mian memkonacion (sebevĕdomí), ĉar mi posedas almenaŭ unu fremdan lingvon. En Eo mi jam legis multajn librojn, dum en la angla aŭ germana eĉ ne unu, ĉar tiujn lingvojn mi ne sukcesis ellerni tiom, kiom Eon. Mi simple ne kuras kun la grego, kiu unue amase postkuris la anglan, sed trovinte, ke ĝi estas malfacila, tuj ŝanĝis sian intereson al la franca, germana, poste al la hispana, itala kaj aliaj lingvoj. Mi flegas (pěstuji, pečuji o) tiun lingvon, kiu plene kontentigas min, miajn simplajn amatorajn bezonojn, sed krome mi sentas devon okupiĝi pri tio, kion jam antaŭ jarcentoj antaŭvidis kaj postulis Jan Amos Komenský. Ĉiuj buŝe anoncas sin al la testamento de J.A.Komenský, mi do efektive plenumas ĝin. (Jiří Patera, Praha) ... Skribu al ni ankaŭ vian opinion!

Eva Seemanová – daŭre zorgas pri kultura ŝarĝo de kunvenoj de esperanta rondeto en Železný Brod. Ŝi kulturas ne nur emon al internacia lingvo, sed transdonas ankaŭ sian senmezuran admiron por beleco de ĉeĥa poezio, kion ŝi montris dum la lasta renkontiĝo la 11-an de majo per „Templo kaj fortikaĵo“, elekto el libroj de Pavel Eisner. Ŝi daŭre oferece alveturas al Železný Brod por prezenti neforgeseblajn kulturajn valorojn. Se vi volas esti informita pri la estontaj programoj, skribu afable al Esperanto-klubo 46822 Železný Brod, Husova 148.

Dum 1.-5.a de oktobro okazos en Ústí n.L. tradicia kultura festivalo kun abunda programo kaj eksterlandaj gastoj. Prezoj kiel kutime tre moderaĵ, atingeblaj por ĉiuj esperantistoj. Detalojn pri la programo de ekskursoj kaj kultura vespero sendos al vi Miroslav Smyčka, prezidanto de la klubo, 40005 Ústí nL, Kojetická 90, tel 33848.

SANO – bulteno de esperantistoj – medicinistoj – travivas sian krizon, ĉar nia asocio post dudekjara eldonado ne plu havas monon por ĝia eldonado. Ŝajne savis situacion nia prezidanto Dr Ing Chrdle Csc kun sia firmao Kava-Pech, kiu proponis pluan eldonadon per sia financado. Atentigu medicinistojn kaj esperantistojn kaj neesperantistojn en via cirkaŭaĵo pri eldonado de tiu bulteno, kiu alportas freŝdatajn novaĵojn el medicinista mondo. Esperanto progresos nur tiam, kiam ĝi ankros en fakaj, ne nur medicinistaj rondoj.

Ĝoje ni korektas nian misinformon, transprenitan de nia sendintino de poemo pri Ĉeĥoslovakio de s-anino Odette Pregonara el Genevo, ke la aŭtorino mortis. Laŭ informo de Edith Lutz el Interlaken-Svisujo la poetino Fregonara ne mortis – ŝi estas vivplena kaj estas tre vigla ... Ŝi akceptu nian sinceran pardonpeton. Informon sendis al ni s-ano Ladislav Němec el Frýdek-Místek.

Franca agenturo INTERLAND, gvidita per esperantisto Alexandre Roussete funkcias kiel interkonatiĝa oficejo. Ĝi gajnas priinteresulinon helpe de siaj esperantaj kunlaborantoj en diversaj landoj kaj rekomendas al siaj klientoj lerni E-on. Liberaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj, se vi volas interkonatiĝi kun franca partnero kaj poste eble edziniĝi petu demandilon ĉe Esperanto-Interland, p.schr.1069, 1069 Praha 1.

Ĉeĥa radiostacio Vltava alportis la 6an de januaro 93 temon Artefaritaj lingvoj (Pri teorio kaj praktika uzo de planitaj lingvoj). Partoprenis en ĝi lingvaj fakuloj de filozofia fakultato de Universitato de Karlo la IVa Sáva Heřman kaj doktoro Jaroslav Peregrý, kandidato de sciencoj, kaj konataj esperantistoj Jaroslav Mařík + ing J.Pospíšil. S-ano Miroslav Baroš el Val.Meziříčí sendis al ni plenan tekston de la interbabilado, kiun ni povas kopii kaj sendi al la interesuloj kontraŭ 6 Kč en poŝtmarkoj.

En Rusio aperadas tute nova esp.bulteneto KOMENCANTO. Krom aliaj ĝi enhavas simplajn artikolojn, informojn pri nia movado, ŝercojn, adresojn. La redaktoro sendos ĝin kontraŭ alia esp. gazeto. Skribu al Viktor Kudrjavcev, Box 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio.

Ĉu vi scias, ke la slovaka nacia artisto kaj pentristo Martin Benda estis fervora esperantisto (1888-1971), kiu eldonis bildkarte desegnaĵojn kun tekstoj de slovaka naciaj kantoj. Li estis pentristo de slovaka folkloro. Unu el la lastaj ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj en valoro de 2 Kčs havas lian portreton. Ĝi ne manku en via kolektaĵo de poŝtmarkoj.

Střelba Antonín (47001 Česká Lípa, Ul. Antonína Sovy 1700), fidela esperantisto, kiu neniam forlasis movadon eĉ en tempoperiode de malfavoro, vigla kaj aktiva partoprenanto kaj kunorganizanto de sennombraj kunvenoj en Česká Lípa kaj Nový Bor, ĝisvivas la 5an de julio sian okdekjariĝon! Estu li daŭre sana kaj bonhumora, feliĉa kaj en sia familia rondo kaj en la ligna kabano apud Toljštejn kaj ŝatata ĝardeno!

Kvankam iom malfrue ni ricevis invitilon, ni atentigas pri konferenco de esperantaj instruistoj de pedagogia internacia instituto Freinet ICEM en Pardubice, kiu okazos inter la tagoj 14.-24.a de julio. La konferenco havas riĉan kaj kulturan kaj amuzan programon danke al sia organizantino Jarmila Rýznarová, 53003 Pardubice, Na Okrouhlíku 21. Se vi ne povas jam partopreni en la tuta konferenco, venu almenaŭ saluti la partoprenantojn, kiuj alveturos el la tuta Eŭropo. Unu el la principoj de la Freinet-metodo estas leterinterŝanĝo inter tutaj lernejoj klasoj, dum kiu ligas infanoj internacian amikecon.

Ĉu miraklo? Esperanto-Klubo de emerituloj en Ostrava-Poruba iniciatis tie solenon de „Tago de patrinoj“ en la klubejo. Marde la 11-an de majo, rekontiĝis patrinoj, avinoj, praavinoj de klubo dum amika kunveno posttagmeze. Por ili venis kanti kaj deklami infana grupo el proksima lernejo. Poste kelkaj samideanoj, elektitaj por tiu okazaĵo, priservadis la patrinojn por „maro da dolĉaĵoj, desertoj kaj sudaj fruktoj“ kaj komenciĝis la ĉefa programo, en kiu s-ano Vlado Sládeček, al ĉiu ĉeestanta, eĉ neĉeestanta patrino kantis ian kanton kaj diris spiritaĵojn. Lia gitaro furozis (řádila) kaj la patrinoj kontente aplaŭdis kaj miris ke li lerte (zkušně) elpensas ĝustajn kaj konvenajn kantojn. La plej belan kanton ricevis estrino de E-rondeto, s-anino Lydia Klegová: „En ĝarden' multaj floroj, estas eĉ lilio, - sed inter verdaj floroj, belegas Lidio..“ La amika kunveno estis tute sen alkoholaĵoj kaj sen fumado.

Esperanto-Klubo Vítkovice (Drahomír Kočvara, Hulvácká 18, 70400 Ostrava 3) disvendas stokon da presaĵoj, ekzemple: Granda ĉ-esp vortaro de Filip 654p. (pli frue 104.-Kĉs) nun 39.-Kĉs, Kantareto de popolkantoj Filip 9 Kĉ, surgluaĵoj kun Terglobo grandaj 12,5 hal, diversaj esp. insignoj a' 6 Kĉ ktp.

Monda SAT-kongreso okazos en 1994 (16.-23.7.) en Strážnice. Sekretario-kasisto Vlád'a Hasala, poŝtkesto 34, 69662 Strážnice sendos al vi pluajn informojn. Venos SAT-anoj el tuta Eŭropo, precipe el Francio.

Samtempa frazaro (Jaroslav Mařík) – Vortoj, kiujn vi malfacile trovos: Velura (tenera) revolucio. - Ribelo, ŝtatrevverso. - Murafiŝo. - Ordentena (pořádková) polico. - Marŝantaro (průvod). - Mitoplana (bájný). - Blankkaskuloj. Minacaspektaj klaboroj (kyj, pendrek). - Kaldrono (kotel) ŝlosita sur Nacia Bulvaro. - Eksieĝi (obléhat). - Ataki enfronte kaj endorse (dozad). - Bareto. - Ruĝbaretoj. - Kirasita transportilo (obrnělec). - La lasta guto superfluis. - Postsekvoj. - Gvida rolo de la partio. - Ĉiopovo (všemohoucnost). - Kondamnita al karcero. - Misuzo de oficiala potenco/rajto. - Provokisto ĉefleŭtenanto. - Mafianaj praktikoj disfalis. - Centmilnombraj demonstrantoj. - Federacia parlamento. - Monopola potenco. - Internacia fama dramverkisto. - Sencoplana (smysluplný). - Registraro de nacia kompreno. - Ŝovinismaj tendencoj. - Flago- kaj sloganportantoj.

Esperanto-ĉefha kaj germana matematika terminaro de Ing Jan Werner enhavas 3700 terminojn, 184 p. Havebla ĉe la aŭtoro: 61600 Brno, Kroftova 84.-

SKOLTA ESPERANTO LIGO SLOVAKIO, 81104 Bratislava, Leškova 14 aranĝas internacian renkontiĝon 1.-8. de aŭgusto 93 en vilaĝo Pila sub kastelo Červený Kameň apud Bratislava. Loĝado en kvarlitaj ĉambroj de luksa hotelo Hidrostav, luksa medio, kun manĝado 1400 Sk.

NOVA AFRANKMAŜINSTAMPILO estis eldonada okaze la ĉefha-germana esperanto kongreso en Karlovy Vary 1993 – ĝi estas havebla ĉe Vlád'a Hasala, p.s.34, CS 69662 Strážnice.

1-a Ĉeĥa-germana Esperanto kongreso en Karlovy Vary okazis 28.-31.V.93 kun antaŭvidata (předpokládáný) sukceso. Partoprenis en ĝi pli ol 300 gesamidanoj, kiujn logis (vábil) riĉa programo kun aktiva partopreno de ambaŭ (oba) esperanto-asocioj. Luksa medio de hotelo Termal multe kontribuis al kontento (spokojenost) de partoprenintoj, kiuj jam vendrede vespere dum la interkonatiĝa vespero povis ĝui solenan atmosferon dum Interkonatiĝa vespero, dum ili spektis artkantojn de nia kara operkantisto Miroslav Smyček, kiu ravis ĉeestantoj per sia kultivita dramvoĉo, akompanita de sperta pianoludisto Jan Zimmel. Folklorajn dancojn kaj kantojn prezentis folkloro ensemblo (soubor) Dybeň, dancanta kun gusto kaj junula teperamento. Post bela kultura vespero pliparto de partoprenintoj dolĉe dormis en studenta hejmo, aliaj en luksaj hoteloj diversloke en K. Vary, je plena kontento. Sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al solenaj prelegoj kun esprimo de amikaj sentoj kaj akcento de forto de nova amikeca ligo. D-ro Wolfgang Schwanzer, prezidanto de Germana Esperanto asocio, menciis historion de esperantistaj germana-ĉeĥaj kontaktoj kaj najbara kunkongresoj, el kiuj longtradiciaj Erzmontaraj turismaj tagoj, ŝanĝe aranĝitaj de la kluboj en Karlovy Vary kaj Schwarzenberg. - La urba vicprezidanto de K.V. menciis, ke ĉi tio okazis la unua kongreso de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en la j.1920 kaj la kongreso en 1951 estis lastmomente forvokita (odvolán). La vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio Dro Ulrich Linz (aŭtoro de la fama libro: La danĝera lingvo) atentigis la pri ĉeftemo de la kongreso: E-o – la ŝlosilo de najbaraj kontaktoj en Eŭropo. UEA atente observas la rezultojn de la kongreso. Post fino de dispartigo lima aperis baroj ekonomiaj, kiuj sufokas (dusí) nian movadon, kvankam temas nur pri transira periodo. UEA subtenos la aktivecon de ĉeĥaj esperantistoj kaj proponos aranĝon de Uko 1996 en nia respubliko! - S-anino Fejfičová salutis la kongreson en nomo de Slovaka EA kaj referis pri kontaktoj inter slovaka kaj germana asocioj. - Ernesto Geleta el Nové Zámky salutis la kongreson en nomo de 600.000 hungaroj, vivantaj en minoritato en Slovakio. Hungaroj aparte sentas lingvan izolitecon kaj interesiĝas pri Eo: En 1992 estis registritaj 500 komencantoj precipe de koresponda kurso, el kiuj 200 estas esperdonaj. Hungaroj laŭ aserto de s-ano prof.Geleta tre bedaŭras disfalon de kuna ŝtato kaj pere de sia esperanto-asocio deziras kunlabori kaj kun ĉeĥa kaj kun germana asocioj. Werner Borman el Hamburg, membro de la komitato de UEA menciis detale historion de kuna evoluo de ambaŭ ŝtatoj ek de la tempo Granda Romia Imperio kaj imperiestro Karlo la IV-a (laŭvice Vencelo la Iia). Tiam regis la kontaktaj leteroj la franca, dum oni prelegis en la universitato latine. Nur en la lastaj du centjaroj la signifo de la latina malleviĝis. Nun Eŭropo estas priombrita de Usona influo kaj angla lingvo, kiu tamen estas resistata. Pri apliko de sia lingvo persistas nur francoj kaj esperantistoj. En paŭzo de la solena antaŭtagmezo sekvis arta prezentado de kantisto Miroslav Smyčka. Poste raportis s-ano Hackhausen pri stato de GEA, kiu havas 1600 pagantajn membrojn. Kiel atingi plibonigon? 1. unue per stimulado de kulturo kaj tiaj aranĝoj dum e-konferencoj. E-o ne estas senkultura lingvo kaj ĝi havas sian propran kulturon, kiun ni devas prezenti al la mondo. Plue li prezentis la gazeton „Esperanto aktuell“ kiu havas novan aspekton kaj estos eldonata en du lingvoj (20 DEM jare, 8 numerojn). Oni poste referis pri kunlaboro kun EA en Zairio. Ne lasi forlui eblecon de kunlaboro kun fondota Eŭropa Universitato. - Sekvis raporto pri stato de ĈEA far de la prezidanto ing Dr Petr Chrdle. La nombro malleviĝis – ĝis fino de la jaro 1993 estas supozataj maksimume 2000 membroj. La ŝtato ne subtenas nun jare, tamen nur unuopajn aktivecoj – ekz. konferencojn. Malprofitas ankaŭ korespondaj kursoj.

Tamen okazis plibonigo de informfluo al la membroj. STARTO aperas tute regule en plibonigita formo. Estis eldonita dulingva Jarlibro, kiu informas la membrojn pri aktuala stato de nia movado. Sekcio infana komencis eldoni porinfanan gazeton RINGO. Fiaskis kunlaboro kun turisma agentejo. Profiton alportos ankoraŭ kolektitaj libretoj de kupona privatigo. Membrotizoj ne sufiĉas eĉ kovri elspezojn de STARTO. Financan helpon alportis la Antaŭkongreso 1992 en Prago kaj Kongreso fervojistoj en Olomouc. Nove kunlaboras landa sekcio de SAT. En estonteco necesas aranĝi almenaŭ unu grandan konferencon jare. NOVAJ HONORAJ MEMBROJ estis proklamitaj: prof.Dro Rudolf Horský (longjara gvidanto de evangelia sekcio, kolektinto de 150000 okulvitroj por Afriko), Antonín Janda (meritplena propagandisto de Eo en Kolín), Ing Karel Janouš el Ostrava kaj Bala Ladislav el Moravské Budějovice, longjara kunorganizanto de Someraj E-tendaroj en Lančov. - Dum sabata posttagmezo okazis konferencoj de fakaj sekcioj kaj promenoj tra la urbo kun gvidantoj. Vespere prezentiĝis en monda esp.premiero germana teatra ensembleo „Kia koincido“ la unuaktan teatraĵon de Václav Havel „Aŭdienco“ kaj dramigitaj Apokrifoj de Karel Čapek prezentitaj en altnivela personigo de nia kara aktorino Eva Seemanová, same kiel kelkaj kameraj kantoj precipe de germanaj aŭtoroj prezentitaj de baritonisto Miroslav Smyček. - Dimanĉe antaŭtagmeze okazis laborkunsido de ambaŭ asocioj (aparte). La sekretario Ing Pluhař raportis pri la aktivecoj de la sekretariejo. Vojaĝoficejo Tourgast al nia asocio 100000 Kčs. Poste estis pritraktita propono de la nova statuto. Neatendata diskuto alportis akra interŝanĝo de opinioj pri voĉdona rajto dum tutŝtataj kongresoj kaj elekto de la nova komitato. Nun voĉdonas nur la ĉeestantaj delegitoj de la kluboj. Individuaj membroj ne povas tiel havi sian reprezentanton de la komitato. Se la klubo disfalis, multaj meritplenaj esperantistoj izoliĝas kaj restas sen influo pri elekto de la nova komitato. Pro tempomanko ne povis la diskuto esti gvidata ĝisrezulte. Laŭ propono de Ing Chrdle la problemo estos solvata per enketo en Starto. Se vi havas propran opinion, kiun vi dezirus publikigi, skribu al nia redakcejo. Poste estis de s-ano Pištora prezentataj kandidatoj por la nova komitato. Post en sekreta baloto estis kolektitaj voĉoj de 48 plenrajtaj voĉdonantoj (47 validaj). La rezulto – novaj komitatoj: Ing Pluhař 44, Podhradská Věra 43, Dr Ing Chrdle 39, Ing Kočvara 42, Janáková Vlasta, Polnický Pavel, Hasala Vlád'a. Posttagmeze estis elektita la nova prezidanto de la asocio Ing Vlastimil Kočvara el Opava kaj du vicprezidantoj Pavel Polnický kaj Ing Chrdle. Membroj de la revizia komisiono: Drahoš Kočvara, Olga Barešová kaj Linhart Rýznar. - En dimanĉa posttagmeza diskuto, por kiu restis nur malmulte da tempo ni auskultis interesajn raportojn. Drahoš Kočvara atentigis pri eblo mendi ĉe li novajn kazetojn: pri Video-stop, SET Lančov kaj la kongreso en Havířov (pruntelspezo 20 Kčs + poŝtelpezoj). La muzeo en Č.Třebová akceptas gravajn manlajnajn presaĵojn kaj librojn por sia arkivo. S-anino Janáková parolis pri travivaĵoj de infangrupo en franca kastelo Gresillon. Plue estis menciita eblo de pluraj ĝemeligkapablaj urboj. Dro Borman atentigis ke 130 DM por 14 tagoj en Lančov estas malloga, ĉar okcidentanoj timas pri nekomforta prizorgo en tiel malgranda preĝo. Rekomandataj estas apudlimaj trilandaj renkontiĝoj, kiuj plej konvene prezentas kapablon de E-o, precipe en kultura ĉelimaj unuecaj limregionoj. - Lunde okazis laŭplane du ekskursoj per busoj. Ni disiris kvankam dul alveno ni ĉiuj sentis atmosferon de ekonomia depresio, plenaj de optimismo, ke post limbaroj ni venkos ankaŭ tian ekonomian.

KULTURA FESTIVALO de esperantistoj en Ústí nL, okazos 2.+3.X.93 kun eksterlanda partopreno. Aliĝu ĉe Mir.Smyčka Kojetická 90, 40003 Ústí nL.



Redakcia adreso: Budapeŝto, pk. 87. H-1675, Hungario telefono kaj telefaksa: (+36-1) 1288-258

Abonu ĉe Ĉeĥa Esperanto Asocio, Ing. Vl. Dvořák, 11000 Praha 1, Jilská 10. Abonkoto 360 Kčs jare.

PREPOZICIOJ (Gramatikaĵo) –

daŭrigo, vidu la lastan Verdan Familion. Plua prepozicio, kiun ni pritraktos, estas ANSTATAŬ. Kiel prepozicio ĝi signifas „el la loko de“, aŭ „en la funkcio, rolo de“, ekzemple: „neniu povas protesti, se vi skribos per h anstataŭ supersignoj“ – „anstataŭ krispaj (kudrnaté) haro estas kalvo“, kaj anstataŭ eleganta mantelo estos sako“ – „anstataŭ kupro mi alportos oron.“ - Ĝi povas esti uzata kiel subjunkcio samsenca kaj enkondukanta: 1. infinitivon – eks.: anstataŭ babili, laboru. - 2. KE-propozicion kun indikativo aŭ kondicionalo; ekz.: „anstata tio, ke vi estis forlasita kaj malamata ... Anstataŭ ke ĉiu lernas diversaj lingvojn, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon. - ANSTATAŬ povas esti uzata kiel samsenca vortero: ANSTATAŬ-I ekz. „Nenio povas anstataŭi sanon ... Dum mia foresto (nepřítomnost) anstataŭos min mia kolego ...“ ANSTATAŬ-A = tia, ke ĝi anstataŭas, aŭ povas esti anstataŭata, ekz. anstataŭa rado, ŝlosilo. - ANSTATAŬ-IGI: mezi en la lokon de; doni aŭ roli (sehrát) la taskon de; anstataŭigi dornobarilon per muro, oficiston per oficistino... ni provis anstataŭigi la vorton per alia vorto. - ANSTATAŬ-ILO = substituiilo, surrogato (náhražka).



PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO laŭ Lentaigine:

KOMPAROJ: Kreski kiel fungoj post pluvo. - Kurbiĝadi (krouitit se) kiel diablo en akvo benita (svěcená). Kuri kiel rabia (vzteklý). Malaperi kiel malbona sonĝo. Manĝi tiom, kiel bireto. Marŝi kiel procesio. Mensogi (lhát) kiel gazeto, kalendaro, funebra parolado. Ridi kiel kreteno. Rigardi stulte kiel ŝafo. Salti lerte, gracie kiel urso ebria. Soni (znět) kiel malplena barelo. Tremi, kiel aŭtuna folio. Vivi sur tero kiel en infero (peklo). Vivi kiel kuko en butero (máslo). Vivi kiel hundo kaj kato. Alta kiel cedro. Amara kiel galo (žluč), aloo, genciano, kakao. Bela kiel anĝelo. Certa kiel duoble du kvar. Ĉasta kiel glacio (cudná jako led). Fiera (pyšný) kiel pavo, hispano. Ĵaluza (žárlivý) kiel tigo. Kaprica (vrtošivý) kiel aprilo. Klara kiel kelo (sklep) nokte. Mutega (němý) kiel steloj. Obstina kiel kapro (koza). Premataj kiel sardeloj en barelo. Pura kiel vango de virin' amata (virgulino=panna). Ronda kiel la suno. Ruza (lživý) kiel lupro (vlk). Sekura kiel sub hunda gardo. Stulta kiel ŝtupo, azeno, ansero, kaprino, kukurbo (tykev), napo (tuřín), melono. Vigla kiel lacerto). Diferenco kiel inter tero kaj ĉielo. Okuloj bluaj kiel ĉielo. Tio trafis (postihlo) min kiel tondro (hrom). Talio (pas) kiel vespo (vosa). Tiel simila unu al la alia, kiel du guto da roso, akvo. Tiel densa kiel rafanetoj (ředkvičky) en fasko (svazek). Tio konvenas kiel botoj sur manĝotabloj. KONGRESO. Unueco donas la forton. Preni sur sin la malfacilan taskon aranĝi kongreson. Centralizi la kongresajn servojn. La kongresanoj devas sin anonci plej baldaŭ. Delegitoj rajtigataj. Pagantaj (platící) membroj. Akceptejo. Interkonatiĝa vespero. Urbodomo dekoraciita de ĉiuj naciaj flagoj. Patroni la kongreson. La kongreso okazos sub la aŭspicio de la registraro. Honori por ĉeestado. Mortintaj batalantoj. Honori ilian memoron per leviĝo de sur niaj seĝoj.

Korespondi deziras

Mallongiloj (zkratky): bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝi; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; s-ano=samideano; s-ro=sinjoro; s-rino=sinjinorino; tm=tutmonde.

Kirsch Manfred, D-0 7420 Schmolln, kol pm precipe de iama GDR, iŝ, + kovertajn.

Borisova Jekaterina (24jj), Artjomovskij 692803, Primorski kraj, Kasirskaja 37-4, tutmonde ĉiuj temoj.

Section Esperanto, grupo de komencantoj, F 33320 Eysines, F 39 av.de Saint Medard, tutmonde ĉiuj temoj.

Esperanto klubo, 26 komencantoj, College Albert Camus, F-62230 Outreau

Infana grupo de s-ro Jacques Deny, 3 bis rue Jean Jaures F-42150 La Rica marie.

Nekrevič Julia, 14jj, Belorusio 230026 Grodno, 40 let Pobedy 50-69, tm, ĉt.

Ron Lim, 9 Marine Vista, +11-05, Singapore 1154

Peter A.Dannig G/f, Great Britain TW 10 6NL Richmond Sy, 68 Church Road, tm, ĉt.

Ramon Molera Perdas, esperanto biblioteko, Hispanio 08180 Moi, Barcelona, Palaŭ 17

Koleva Radka, BG Ruse 4,7002, Alla Vazrajane, Bulgario, tm, ĉt.

Richler Edeltraut s-anino, PF 1124, D-8120 Weilheim/OB.

Koresponda servo de Japana Esperanto-Instituto Tokyo-to, Sinziyuku-ku, Wasedamati 12-3, 162 Japanio akceptas adresojn al la tm. Nurkorespondpetoj kun japanaj esperantistoj. Skribu detalajn informojn pri vi (sekso, aĝo, hobiaj ..) kaj kun kiu vi volas korespondi. Via peto estos registrita en komputoro. Estas dezirinde, se vi aldonos 2 internaciajn respondkuponoj. (Haveblaj iam niaj filatelaj vendejoj).

D-ro H. Radishi Herat, saadat Co, Afganio, pioniro de Eo, dez k tm ĉt.

Infengrupo ĝis 12jj, gvidantino s-anino Dona Dietsch, akceptas gratulojn kaj korespondpetojn: Mac Arthur School, Ft.Leavenworth, KS 66027, Usono

Eva Gergely Palczertné, 24j instruistino, Domokos 26 26 IV/20, H-4027 Debrecen dez k pri kuirarto, turismo, literaturo, instruaj sistemoj ktp.

Norberto Mollo, 38j profesoro de biologio, RA-6100 Rufino, SANTA FE, c.c.138, ĉt.

Jag Narain Sharma, vic-prezidanto de tuthinda Esperanto federacio, 38 Beldari Lane Lalbach Lucknov 22061 India, bezonas adresojn por kor de hindaj esp-istoj.

*

Esperantský klub

CZ 29501 Mnichovo Hradiště

Podávání novinových zásilek
povoleno oblastní správou pošt
Střední Čechy v Praze, čj. P/Piš
2295/92 ze dne 16.XI.1992